# *La ministra konsilantaro pritraktas esencajn temojn lige al la reordigo de la ekonomio.*



Estis informite ke dum la semajnofino la ministra konsilantaro de Kubo kunsidis por pritrakti temojn kiel la mon-unuecigo kaj perfektigo de la salajroj, pensioj kaj aliaj enspezoj ligitaj al la aktualigo de la kuba ekonomia modelo.
La kunsidon prezidis Raúl Castro kiu emfazis la kompleksecon de tiu ?i temo kaj la bezonon ?in entrepreni popa?e kaj konstante. “Oni devas da?re studi la tutan procezon”, li asertis.
Aliflanke, Leonardo Andollo, dua estro de la konstanta komisiono por starigi kaj evoluigi tiun ?i procezon, prezentis la bazajn konceptojn kiuj devos regi la rilatojn inter la ministra konsilantaro kaj la organismoj de la centra ?tata administracio, rilate al la superaj organizoj de la entreprenaj estraroj (OSDE) kongrue kun la bezono apartigi la ?tatajn funkciojn de la entreprenaj.
Alia temo de la kunsido rilatis al propono de politiko por ellabori la Le?on de funkcioj kaj servoj policaj la? la gvidlinio 140 aprobita de la ?tato kaj la partio,  celanta garantii la civitanan trankvilecon; la prezentita dokumento starigas la bazajn konceptojn de la polica agado, kie estas vitalaj la respekto al la konstitucio kaj la le?oj, la profesieca traktado, etika kaj homa, la agado kun klara sin identigo, rapideco kaj racieco en la laboro.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/19005-la-ministra-konsilantaro-pritraktas-esencajn-temojn-lige-al-la-reordigo-de-la-ekonomio

**Radio Habana Cuba**